

## INDIKOJ POR REDAKTI ARTIKOLON PROPONOTAN AL LA REVUO „NOTES MUZYCZNY”<sup>1</sup>

Proponataj tekstoj, en la normigita A4 formato, devus esti skribitaj en Microsoft Word programo, la 1997-2003 aŭ 2007 versioj.

**Publikigotaj artikoloj ampleksas** ekde 20,000 ĝis 40,000 signoj inkluzive de interspacetoj kaj de piednotoj<sup>2</sup>. Se tamen aŭtoro opinias, ke la temo bezonas pli grandan amplekson ol la sugestita, bonvolu kontakti la ĉefredaktoron.

### LA ĈEFTEKSTO

- tiparo Times New Roman, 12 poentoj
- interlinio: 1,5
- defaŭltaj marĝenoj; 2,5 cm
- krommarĝenoj de alineo: 0,5 cm
- titoloj de artikoloj - tipografia emfazo (dika tiparo), majusklo
- intertitoloj - tipografia emfazo (dika tiparo)
- numeroj de paĝoj: malsupre kaj dekstre de paĝo
- teksto egaligita maldekstre (sen tutegaligo)

### CITAĴOJ

- Citaĵoj aperantaj en la teksto devus esti skribitaj kun utiligo de la laŭnormaj esperanta citiloj („”), sen kursivo, kaj la piednoto devus doni la fonton de la citaĵo: „ĉi tio estas citaĵo”<sup>3</sup>.
- Citaĵoj pli longaj ol 3 versoj devus esti apartigitaj de la ĉefteksto kaj lokigitaj en nova alineo laŭ jenaj reguloj;

skribo rekta, sen citiloj, tiparo Times New Roman: 11 poentoj,  
dekstraj kaj maldekstraj krommarĝenoj: 1 cm,  
interlinio antaŭ kaj post la alineo: 6 poentoj,  
neniu alineo deŝovita.

- Se la citaĵo estas traduko el fremdlingvo (t.e. alia ol Esperanto), bonvolu mencii la aŭtoron de la esperantigo. En la ĉeftekston bonvolu lokigi la citaĵon en Esperanto, kaj en la piednoton citaĵon en la originala lingvo.
- Se citita tekstero („citaĵo en citiloj”) enhavas alian tekston cititan („«teksto ene de la citaĵo»”), necesas uzi francstilajn citilojn laŭ jena maniero: „«teksto ene de citaĵo» citaĵo en citiloj”.
- Vortoj kiujn la aŭtoro de la artikolo enkondukas en la citaĵon devus esti enskribitaj en kvadrataj krampoj, simile kiel en la kazo de forlasita fragmento de la teksto - skribita per tripunkto en kvadrata krampo [...].
- Kiam oni citas vortojn de *aŭtoro\_1*, sed oni prenas ilin ne rekte el verko de la *aŭtoro\_1*, sed el verko de *aŭtoro\_2* (t.e. *aŭtoro\_2* referencas en sia verko al la libro de *aŭtoro\_1* kaj citas liajn/ŝiajn vortojn), tiam la piednoto devus doni jenajn infomojn: priskribo de *aŭtoro\_1*, citita laŭ: priskribo de la verko de *aŭtoro\_2*.

### PIEDNOTOJ

- tiparo Times New Roman, 10 poentoj
- interlinio ununura (1 linio)

---

<sup>1</sup> Bonvolu apliki la normojn por redakti sciencajn notojn, materialojn por la kroniko, recenzojn kaj anoncojn.

<sup>2</sup> La longecon de la artikolo eblas kontroli per Tools → Wordcount

<sup>3</sup> Bonvolu lokigi la nombron de la piednoto inter la dekstra citilo kaj punkto.

- piednotoj kun referencoj en supra indekso (enkondukataj aŭtomate per funkcio de Word: References → Insert a footnote)

## ARAŜGO DE ARTIKOLO

Sur la unua paĝo, antaŭ la ĉefteksto devas troviĝi la nomo kaj la antaŭnomo de la aŭtoro kaj la plena nomo de la institucio, en/por kiu la aŭtoro laboras.

Ni petas limigi tekstaraŝgon; precipe bonvolu eviti aŭtomatan dividadon de vortoj kaj ĝisrandigon, kaj ne uzi la klavon ENTER en la mezo de frazoj.  
La aŭtoron sendantan la tekston al ni, ni petas doni kontaktodatumojn (retpoŝtadreso, telefonnumeron, poŝtadreson)

## ILUSTRAĴOJ KAJ MUZIKEKZEMPLOJ

Ilustraĵojn kaj aliajn grafikaĵojn bonvolu ne enmeti en la ĉeftekston: oni devas sendi ilin kiel apartajn, numeritajn kaj priskribitajn dosierojn en grafika formato (TIFF, PDF, JPG, PNG), prefere en bildkvalito 300 ppi. En la ĉeftekston oni devas enskribi lokojn, numerojn kaj subskribojn de la respektivaj ekzemploj. Ni petas numeri „bildojn” (fotografaĵojn, ilustraĵojn, gravuraĵojn ktp.) kaj muzikekzemplojn aparte - se en artikolo aperas kaj muzikekzemploj kaj aliaj ilustraĵoj, bonvolu sendi ilin en du apartaj dosierujoj. La numeroj de ilustraĵoj kaj muzikekzemploj en dosieroj devas kongrui kun tiuj en la ĉefteksto.

Bonvolu ne uzi en nomoj de dosieroj punktojn kaj specialajn signojn (inkluzive la esperantajn); anstataŭ spacetojn bonvolu uzi malsuprajn substrekojn, ekz. Ekzemple\_1.tif [dosiero kun sufikso .tif].

Muzikekzemploj estos transskribataj kaj koherigitaj de nia grafikisto. Post la transskribo la grafikisto sendos ilin al la aŭtoro por kontrolado kaj akcepto.

**La Aŭtoro, kadre de la eldona interkonsento, konfirmas, ke li posedas kopirajtojn pri aldonaj materialoj aligitaj al la artikolo (ekz. skanaĵoj de manuskripto, grafikaĵoj), aŭ ke li disponas pri konsentoj de posedantoj de kopirajtoj por utiligi ilin. Krome, la Aŭtoro deklaras, ke laŭ sia scio ne ekzistas ajnaj cirkonstancoj, kiuj povus eksponi la Eldoniston je respondeco kontraŭ triaj partioj pro eldono kaj distribuo de la Verko.**

## PIEDNOTAJ REGULOJ

En la piednotoj referencantaj al fontoj oni ĉiam devas doni la lokon kaj jaron de la eldono kaj ankaŭ numerojn de paĝoj. En la kazo de interretaj fontoj la dato de aliro devus estis donita en kvadrataj krampoj. Bonvolu uzi nur malsuprajn piednotojn.

Bonvolu ne doni nomon de la eldonisto de la publikaĵo.

Citante denove la fonton en la artikolo, bonvolu utiligi jenajn latinajn kaj esperantajn mallongigojn:

- ibid.
- op. cit.
- idem/eadem
- et. al. (kune kun aliaj aŭtoroj)
- s.l. (sen loko)
- s.d. (sen dato)
- cfr. (komparu)
- vidu:

En piednotoj bonvolu skribi nur la inicialojn de la antaŭnomoj (de aŭtoro, redaktoro, tradukisto ktp.). La plenajn antaŭnomojn bonvolu doni en la bibliografio.

Se la citita verko estas tradukaĵo el alia lingvo, bonvolu ĉiam doni la inicialon de la unua antaŭnomo kaj la plenan nomon de la tradukisto (mallongigo: trad.).

En la kazo de pluraŭtora verko bonvolu doni la inicialon de la unua antaŭnomo kaj la plenan nomon de la redaktaro (mallongigo: red.).

Fine de la priskribata fonto bonvolu ĉiam uzi punkton.

## **EKZEMPLOJ DE PIEDNOTOJ**

### **Libro de unuopa aŭtoro**

Antaŭnomo kaj nomo de la aŭtoro, *Titolo. Subtitolo*, trad. (antaŭnomo kaj nomo de la tradukisto), loko, jaro de eldono, p. 00.

U. Lins, *La danĝera lingvo*, Rotterdam 2016.

Idem, *Die Ōmoto-Bewegung und der radikale Nationalismus in Japan*, München-Wien 1976.

A. Korĵenkov, *Homarano. La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L. L. Zamenhof*, Kaunas 2009, p. 230.

Idem: *Historio de Esperanto*, Kaliningrad 2005.

Sekva citado de la verko de unuopa aŭtoro:

A. Korĵenkov, op. cit., p. 112.

Ibid., s. 116-120.

Sekva citado de unu el pluraj verkoj de la sama aŭtoro:

A. Korĵenkov, *Homarano...*, p. 176. [oni ne donas jam op. cit. post la titolo]

### **Verko plurvoluma / unu el la volumoj de plurvoluma verko**

La numeron de volumo bonvolu doni post la titolo de verko plurvoluma (antaŭ la eventuala titolo de volumo) per arabaj ciferoj kaj sen punktoj.

*Titolo de la plurvoluma verko*, vol. (numero de volumo), *Titolo de la volumo*, red./trad./prilab./enkond. (antaŭnomo kaj nomo), loko, jaro de eldono, p. 00.

*Encyklopedia Muzyczna PWM*, biografia parto, vol. 1 (A–B), red. E. Dziębowska, Kraków 1979.

Antaŭnomo kaj nomo de la aŭtoro, *Titolo de plurvoluma verko*, vol. (numero de la volumo), *Titolo de la volumo*, red./trad./prilab./enkond. (antaŭnomo kaj nomo), loko, jaro de eldono, p. 00.

A. Mickiewicz, *Dzieła*, vol. 3, *Utwory dramatyczne*, red. S. Pigoń, Warszawa 1949.

### **Pluraŭtora verko**

*Titolo. Subtitolo de verko*, red./prilab. (antaŭnomo kaj nomo), loko, jaro de eldono, p. 00.

*La arto labori kune. Festlibro por Humphrey Tonkin*, red. D. Blanke kaj U. Lins, Rotterdam 2010, p. 23.

### **Artikolo en pluraŭtora verko**

Antaŭnomo kaj nomo de aŭtoro de la artikolo, *Titolo de la artikolo*, en: *Titolo de la pluraŭtora verko*, red. (qntaŭnomo kaj nomo de la redaktoro), loko, jaro de eldono, p. 00.

J. Lindstedt, *Lingvo - rimedo aŭ resurco?*, en: *La arto labori kune. Festlibro por Humphrey Tonkin*, red. D. Blanke kaj U. Lins, Rotterdam 2010, p. 51-62.

### **Traduko de artikolo en pluraŭtora verko**

Antaŭnomo kaj nomo de aŭtoro de la artikolo, *Titolo de la artikolo*, trad. (antaŭnomo kaj nomo de la tradukisto), en: *Titolo de la pluraŭtora verko*, red. (Antaŭnomo kaj nomo de redaktoro), loko, jaro de eldono, p. 00.

N. Frye, *Archetypy literatury*, trad. A. Bejska, en: *Współczesna teoria badań literackich za granicą*, vol. 2, ed. H. Markiewicz, Kraków 1972.

### **Artikolo en unuaŭtora verko**

Antaŭnomo kaj nomo de aŭtoro de la artikolo, *Titolo de la artikolo*, en: *ibid.*, *Titolo de la verko*, loko, jaro de eldono, p. 00.

M. Lurker, *Mity, baŝnie i sny*, en: *ibid.*, *Przesłanie symboli w mitach, kulturach i religiach*, trad. R. Wojnarowski, Kraków 1994.

M.R. Mayenowa, *Struktura tekstu*, in: *ibid.*, *Poetyka teoretyczna. Zagadnienia języka*, Wrocław 2000.

### **Artikolo en revuo**

- titolon de la revuo bonvolu skribi en citiloj ,sen kursivo
- bonvolu ne doni prepozicion [en:] antaŭ la titolo de la revuo

Antaŭnomo kaj nomo de la aŭtoro, *Titolo*, „Nomo de la revuo”, jaro, numero 00, p. 00-00.

B. O. Åradsson, *Komparo de paroloj el retorika vidpunkto*, „Język. Komunikacja. Informacja” 2018, p. 101-115.

A. Heck, *Nomlisto de la konstelacioj*, „Scienca Revuo” 1975, numero 1, p. 3-6.

### **Artikoloj en enciklopedioj, vortaroj, leksikonoj**

Aŭtoro de la artikolo, *Titolo de artikolo*, artikolo en: *Titolo de la enciklopedio / vortaro*, vol. 00, red. (Antaŭnomo kaj nomo), loko, jaro de eldono, p. 00.

E. Dziębowska, *Chomiński Józef Michał*, artikolo en: *Encyklopedia Muzyczna PWM*, biografia parto, vol. 2 (C–D), red. E. Dziębowska, Kraków 1984, p. 108.

### **Fontoj interretaj**

Aŭtoro, *Titolo*, retpaĝo <http> [aliro - en kvadrataj krampoj]

R. Nielsen, *Ni ne bezonas esperantistan politikpartion* [interrete], <https://teokajlibroj.wordpress.com/2019/01/26/ni-ne-bezonas-esperantistan-politikpartion/> [aliro: 29.03.2021].

## BIBLIOGRAFIO

Bibliografion oni devas aranĝi alfabete laŭ nomoj de aŭtoroj - kontraŭe al piednotoj, unue oni devas doni la nomon kaj poste la antaŭnomon de la aŭtoro de la publikaĵo. Verkojn, kies unua elemento de priskribo estas titolo devus esti lokigita en la ĝeneralan alfabetan ordon, laŭ la unuaj literoj de la titolo.

Bonvolu doni plenajn antaŭnomojn de aŭtoroj, tradukistoj, redaktoroj itp.

Krom tio, simile kiel en piednotoj, post la titolo bonvolu doni lokon kaj jaron de eldono, kaj en la kazo de artikolo el revuo aŭ enciklopedio/vortaro, ankaŭ numerojn de paĝoj. Je la fino de ĉiu priskribo skribu punkton.

## EKZEMPLO DE BIBLIOGRAFIO EN ALFABETA ORDO

Bristiger Michał, *Związki muzyki ze słowem*, Kraków 1986.

Krawczyk Dorota, *Język i gra, czyli o muzyce postmodernistycznej*, „Muzyka” 2005, numero 2, p. 79–105.

*Literatura polska. Przewodnik encyklopedyczny*, red. Julian Krzyżanowski, vol. 2 (N–Ż), Warszawa 1985.

*Poetyka*, vol. 1, red. D. Ulicka, Warszawa 2000.

Schaeffer Bogusław, *Dymitr Kabalewski*, artikolo en: *Muzyka XX wieku. Twórcy i problemy*, Kraków 1975, pp. 202–203.

Tadeusz Baird, *Sztuka dźwięku, sztuka słowa*, red. Krystyna Tarnawska-Kaczorowska, Warszawa 1984.

Tarnawska-Kaczorowska Krystyna, *Tadeusz Baird. Głosy do biografii*, Kraków 1997.

Toporowska Barbara, *Problemy artykulacyjne w dawnej muzyce na instrumenty klawiszowe*, Zeszyt Naukowy Akademii Muzycznej w Poznaniu nr 6, Poznań 1984.

## RESUMOJ DE ARTIKOLO

Aŭtoroj de artikoloj kaj sciencaj notoj, kune kun la teksto, devas sendi ĝian resumon en Esperanto (en aparta dosiero) - proksimume unu paĝon de teksto en A4 formato (ĉirkaŭ 2,000 da signoj kun spacetoj). La resumoj estos tradukataj en la anglan de dungita tradukisto.

## ETAPOJ DE LA REDAKTA LABORO

1. Redaktado de la enhavo - en kunlaboro kun la aŭtoro.
2. Lingva redaktado - en kunlaboro kun la aŭtoro; antaŭ kompostado la aŭtoro ricevos la finan version de la teksto por akcepto (bonvolu kompletigi eventualajn mankojn kaj fari korektojn dum 7 tagoj ekde kiam la ĉefredaktoro sendis al vi la artikolon). **Bonvolu prilabori plej aktualan version de la teksto ricevita de la redaktoro.**
3. Transsendo de artikoloj al recenzantoj post redaktado kaj akcepto far' aŭtoroj kaj korektisto.
4. Teknika redaktado, kompostado.
5. La fina provlego de la teksto post kompostado. **Ĉar dum ĉi tiu etapo la aŭtoro ne plu rajtas fari signifajn ŝanĝojn en la artikolo, ni petas atente kontroli la tekston antaŭ la kompostado**
6. Presado de la revuo

Ni afable petas respekti ĉiujn limdatojn, ĉar tio permesos teni la laborritmon de la revuo. Ni ku-raĝigas aŭtorojn sendi tekstojn antaŭ la limdatoj.

Plej amike

Redaktaro de la revuo „Notes Muzyczny”